


Kataluna Esperantisto



**NUMERO 330 (96)
KVINA EPOKO
APRILIO-JUNIO 2004**

Vigligisto ŝanĝiĝas

***Esperantistoj
manifestacias***

Librotago

Sukcesa Linguapax

Novajo-svarmo

Nova romano

Esperanto pristudata

Esperanto politike

***El romaní,
llengua oficial?***

L'arameu al cinema

ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

L'Europa de les 20 llengües oficials

Amb la incorporació de deuestats membres nous, la Unió Europea ha passat d'onze llengües oficials a vint. Poc es pensaven els sis estats membres fundadors, amb quatre llengües oficials considerades amb plena igualtat de drets, que s'arribaria a una situació com aquesta – i que amb la previsible incorporació de Romania i Bulgària el 2007 s'incrementarà amb dos idiomes més.

El tractat d'adhesió dels nous estats no ha previst cap excepció al reglament de 1958 que va instaurar el principi general de multilingüisme integral. Així, tots els idiomes han d'estar disponibles tant per a la traducció com per a la interpretació. Totes les esmenes –desenes de milers cada any– han d'estar traduïdes a tots els idiomes o en cas contrari es correria el risc que un grup de la cambra o 32 eurodiputats demanin la suspensió d'una votació.

Això fa que es prevegi uns costos lingüístics a l'Europarlament de 443 milions d'euros l'any, molt per damunt dels 274 milions que costava el sistema vigent fins ara de traducció a onze llengües, que absorbia el 30% del pressupost de la cambra.

El parlament ha rebutjat el monolingüisme o la instauració de tres o quatre llengües de treball. Per reduir costos, ha instaurat l'ús d'idiomes pivot, és a dir llengües que s'utilitzen per traduir d'un idioma a un altre en dues fases. Així, per exemple, per traduir del letó al grec es pot passar per l'anglès, traduint del letó a l'anglès i d'aquesta llengua al grec. D'aquesta manera les 380 combinacions de traduccions possibles es poden reduir dràsticament. La qualitat, però, se'n ressent molt. A més, també es discuteixen quines han de ser les llengües pivot i entre les opcions proposades hi figura l'esperanto.

Cal dir també que en reunions més informals sí que es redueix força el nombre de llengües que s'usen. L'any 2000 es van fer a la seu del Consell de Ministres unes 4500 reunions preparatòries de les reunions ministerials. Si s'hagués utilitzat el sistema de traducció integral en els onze idiomes, s'hagués hagut d'incrementar el pressupost fins a un 40%. Amb vint llengües, el creixement és exponencial. □



Parlament Europeu a Estrasburg



Tre ĝojindas tiu bunteco de multaj disaj novaĵoj

Jen antaŭ viaj okuloj informplena numero de *Kataluna Esperantisto*. Ne okazis grandaj aranĝoj, sed multis la etaj novaĵoj: plaĉa renkontiĝo en Cerdanya, elstara agado dum la librotago, grava partopreno en lingvistika kongreso, diversaj aliĝoj al malsamaj neesperantistaj aktivadoj (i.a. tri manifestacioj!), ktp. Tre rimarkindas la gazetara rikolto: parte oni ĝin ŝuldas al la iniciatemo de nia asocio aŭ de niaj membroj, sed verŝajne plimulte ĝi evidentigas, ke la granda plivastiĝo de Eŭropa Unio lokis la aferon de lingvouzo en internaciaj instancoj en elstaran lokon de la diskutoj – kaj eĉ pli en nia lando, kie la kataluna profitas la sama ŝancon por plenrajte postuli sin.

Por ni tre ĝojindas tiu bunteco de multaj disaj novaĵoj. Ili montras la aktivecon de rimarkinda kvanto da homoj: eĉ se foje laŭ diversaj engaĝiĝoj, kaŭze de malsamaj tempoblecoj aŭ emoj, ekzistas ia sento de burĝoniĝo. Ni ne devas blinde fidi, ĉar tio povas esti nur iom hazarda fenomeno kaj la tenado de la akirata nivelo postulas neetan laboradon regulan, sed ĉio ŝajnas esperiga.

Legu kaj mem konstatu. Kaj bonvolu partopreni.

Hektor Alos i Font

Nova vigligisto

Akceptinte pli altiran postenon, Josep Maria Milla forlasis en majo sian laboron en KEA. Al li ni ŝuldas plimulton de la aranĝoj organizitaj de la asocio kaj la komencon de nova etapo en la gazetara informado. Li ekkreis infrastrukturon, kiun kvankam evoluigendan nia asocio longe profitos. Transprenis la taskon alia sperta movadano: Karles Berga. Li lernis esperanton en 1982 kaj baldaŭ aktivis, interalie kiel fondinto de la junulara revuo *Kata Luno* kaj vicprezidanto de Kataluna Esperanto-Junularo. Li membris ankaŭ en la estraro de KEA. Nuntempe li ĉefe agas en la kadro de Barcelona Esperanto-Kontaktejo, kiun li iniciatis.

Ĉi-numere kunlaboris: Karles Berga, Mon Cardona, Manuel Casanoves, Maria Garcés, Ricard Guasch, Ferriol Macip, Joan Inglada, Xavier Margais, Pedro Martín, Neus Moly, Ramon Perera, Christian Pinard, Francesc Poblet, Guillem Portell kaj Sylvie Roques.

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Ret-Info, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto-ct.org
Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org
Ret-listo: nia_listo@esperanto-ct.org

Kotizoj por la jaro 2004: Individua Abonanta Membro 35 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 75 eŭroj; Individua Dumviva Membro 750 eŭroj; Kolektiva Membro 75 eŭroj; Juna Membro 23 eŭroj.
Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053

UEA-konto: keae-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Arnau Massanes, Mateu Vic.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Òscar Puig, Luz Vázquez.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Guillem Portell; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Impres a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Nia agado

Manifestacio

Dekkelko da esperantistoj renkontiĝis por manifestacii en Barcelono kontraŭ la okupacioj de Irako kaj Palestino la 20an de marto, en unu el la tutmondaj pacmarŝoj okaze de la unua datreveno de la dua iraka milito. En maro da 150 000 homoj, laŭ policaj infomoj, la esperantista grupeto estis sufiĉe videbla danke al du afiŝoj, grandega de Barcelona Esperanto-Kontaktejo –jam promenigita dum la manifestacio de la pasintjara 15a de februaro– kaj malgranda en esperanto kun la teksto “Zapatero: kion vi faros por evititio?”. Ambaŭ vekis sufiĉe da scivolemo, kiun satigis klarigoj kaj flugfolio pretigita de BEK.

Prelego

Firdaus Ŝukurov, prezidanto de Taĝika Esperanto-Asocio, prelegis la 20an de marto en Amikoj de Unesko pri sia malgranda kaj nekonata ĉe ni, sed belega, lando. La prelego estis iom malfruigita por helpi la partoprenon en la samtaga kontraŭmilita manifestacio, kaj tio permesis kunigi dekon da atentemaj kaj demandemaj partoprenantoj. Post rapida geografia kaj historia prezento de la lando, la preleganto montris interesajn lumbildojn pri biciklista karavano inter Hoĝento kaj Duŝambeo (la dua respektive la ĉefa urboj de lando). En ili eblis konatiĝi kun la diversaj pejzaĝoj de Taĝikio laŭlonge de la pli ol 500 kilometroj disigantaj la du urbojn kaj du montopasejoj pli ol 3000-metrojn altaj.

S-ro Ŝukurov, krome, ĝentile donacis al KEA la libron *Versoj* de Rudaki, verkisto, kiu vivis inter ĉirkaŭ 860 kaj 941, konsiderata la fondinto de la persa kaj taĝika literaturo. La verko enhavas la plimulton de lia postrestinta verkaro kaj estas havebla en la asocia biblioteko.

Librotago

La 23an de aprilo KEA organizis du budojn: unu en Sabadell, jam funkcianta de multaj jaroj, kaj alian en la barcelonaj *Rambles*. Ambaŭ montriĝis tre sukcesaj: oni disdonis flugfoliojn kaj libromarkilojn kaj disvendis librojn, ĉefe speciale



Fotis: Francesc Poblet

pretigitan lumdiskon kun instrua materialo, gramatikojn kaj librojn pri lingvaj problemoj kaj ekolingvistiko. Elstaris ankaŭ la lastaj eldonaĵoj de katalunaj esperantistoj: la komiksoj *Malpli da sekso kaj pli da sekso* kaj *La vivo simplas, temas pri amo!* de Arnau Torras, la vojaĝlibro *Amb l'esperanto a la motxilla* (kaj ĝia ĵus eldonita hispana traduko *Con el esperanto en la mochila*) kaj la katalunlingvaj romanoj de lokaj esperantistoj, aperintaj en la lastaj monatoj, en kiuj esperanto iel rolas (*L'enigma de Jules Verne* de Abel Montagut, *La síndrome dels estranyos sons* de Jordi Solé Camardons kaj *Berlin, via morta* de Francesc Poblet). La foiro utilis ankaŭ por kontakti diversajn aliajn asociojn cele al estonta kunlaboro.



La esperanta mondvojaĝo en la hispana

Unu jaron post la eldono de la rimarkinde sukcesa vojaĝlibro *Amb l'esperanto a la motxilla*, aperis ĝia hispana traduko. La eldono ankaŭ laŭaspekte tute paŭsas la katalunan originalon, ĉar ĝi estas eldonita de eldonejo Milenio, la marko por la hispanlingvaj libroj de Pagès, la eldoninto de la kataluna originalo. KEA fariĝis la distribuanto de la verko kaj komencis diskonigi ĝin tra la hispanlingvaj landoj, por ke ĝi fariĝu tiel bona propagandilo kiel ĉe ni.

Optika disko

KEA eldonis optikan diskon okaze de la librotago. Temas pri eldonaĵo pensita por lernantoj de la lingvo, surbaze de ideo de Manel Vinyals, tre pligrandigita.



La disko enhavas klarigojn, en la kataluna, pri la lingvo kaj la kulturaj aspektoj de esperanto. Tamen ĝi ĉefe kunigas materialojn elŝutitajn el Interreto. Inter ili elstaras la brazila plurmedia kurso, vortaroj (difinitaj, fakaj kaj tradukaj, i.a. la Reta Vortaro kun 8500 kapvortoj), gramatikoj (i.a. la fama PMEG de Bertilo Wennergren), tekstoj por komencantoj kaj progresantoj (el la selekto fare de Gemma Armadans eldonita antaŭ pluraj jaroj en *Kataluna Esperantisto*), revuoj (i.a. plenaj numeroj de *Kataluna Esperantisto*, *Monato* kaj *Kontakto*), kvardeko da elektronikaj libroj, ĉirkaŭ dudek radioelsendoj kaj bunta specimeno de la esperantlingva muziko.

Temas pri granda laboro kolekta, ordiga kaj klariga, en kiu partoprenis 11 kunlaborantoj, kaj kiu utilas same al komencantoj kiel al progresantoj kaj el kiu profitos ankaŭ spertaj esperantistoj. Ĝi

fakte fariĝos la bazo por la semajnfina kurso eksperimenta okazonta en La Sénia en la unua semajnfino de junio.

Esperanto 2004. Kataluna Esperanto-Asocio, 2004. 4 eŭroj. 417 MB.

Flugfolio

Okaze de la librotago, KEA pretigis novan flugfolion. En A5-formato, sen faldo, la ĉefpaĝo kunmetas fotojn de diversaj manifestacioj kun esperantista partopreno. La devizo tekstas “No se'n parla, però es parla”. La kontraŭa flanko tekstoplene prezentas esperanton surbaze de la dokumento “Ĝisdate pri esperanto” pretigita de la Brusela Komunikad-Centro de Universala Esperanto-Asocio kaj Eŭropa Esperanto-Unio. La tekston pretigis Josep Maria Milla kaj la flugfolion kompostis, kiel kutime, Ferriol Macip.

Renkontiĝo en Porta

Okazis dum la 1a kaj la 2a de majo la “printempa lerna renkontiĝo”, organizita en Porta de KEA.

Ni kutimas skribi en la raportoj, ke tiaj renkontiĝoj ĝuis “agrablan kaj amikan etoson”. Mi skribas ĉi-foje: juna kaj refreŝiga etoso, ĉar el la dudek partoprenintoj, multaj estis freŝbakitaj esperantistoj. Post agrabla pikniko ĉe la lago de Puigcerdà, ni iris al la gastejo, kie fajna pluveto kunigis nin senbedaŭre por paroligaj kaj amuzaj ludoj. La prezento de tutmondaj esperantaj revuoj tre interesis la atenteman aron. La verkisto Abel Montagut klare kaj riĉe prelegis pri esperanta literaturo, malfermante antaŭ ni vojojn al la feliĉeco de horoj de legado, provizitaj danke la libroservoj de KEA kaj de Karles Berga.

La babiladojn vigligis la komuna vespermanĝo, kaj la fajro, kiu kunigis nin dum la malfrua vespero, naskigis kantojn. Frue vekitaj, post abunda matenmanĝo, ni piediris al la ruinŝtonoj de la kastelo de Porta, sub printempa suno ludante kun la nuboj. Marfiŝaĵo, neatendita en tiuj montaroj sed tre bonguste preparita, atendis nin por la lasta tagmanĝo. Trinkinte kafon, ĉiuj forflugis kvazaŭ hirundoj.

Fruktedona por ĉiuj estis tiu renkontiĝo, precipe ĉar ni preskaŭ neniam krokodilis,

Renkontiĝo en Porta.
Fotis: Sylvie Roques



kaj ĉar la temoj de la prelegoj interesis ĉiun ajn esperantiston. Agrabla ĝi estis, ĉar ni ĉiuj venis celante krom lerni kaj praktiki ankaŭ babili kaj amuziĝi. Ni ripetos tiujn renkontiĝojn, ĉiel bonajn por ĉiuj.

Christian Pinard

Libroprezentado

La 6an de majo prezentiĝis en librejo Catalònia, unu el la plej famaj el Barcelono, la libro *Amb l'esperanto a la motxilla*. Preteksto por tio estis la ĵusa apero de la hispana traduko, ĉar ja la libro estis eldonita antaŭ unu jaro. Prezenti la verkon Josep Lluís Alay, prestiĝa specialisto pri centra Azio kaj Tibeto, kiu verve rekomendis la libron kiel trafan prezenton de tiu mondoparto kaj tre plaĉan legaĵon. Bedaŭrinde la aranĝon partoprenis nur ses homoj, ĉefe esperantistoj jam legintaj la libron: laŭ la organizintoj, tio ne estas surprizo, ĉar simile okazis en la tri aliaj libroprezentadoj dum la sama semajno. Ili tamen plu taksis tiajn aranĝojn esencaj por diskonigi eldonajn novaĵojn, kaj denove invitis esperantistojn prezenti siajn verkojn, eĉ eventuale kunveni por babili pri literaturo.

Forumo en Prada

Esperanto Conflent partoprenis en la unua Forumo de lokaj asocioj, kiu okazis en Prada la 8an de majo, feria tago en Nord-Katalunio. La budo prezentis informojn pri esperanto kaj proponis multajn revuojn kaj informilojn, katalun- kaj franc-lingve. Deĵoris la gelernantoj de nia grupo. La organizantoj lokis nin en la kvartalo de la “kontraŭtutmondiĝo”, apud Attac, Survival, “Ne al atomenergio” k.s. kaj ĉe la katalunaj lernejoj “La Bressola”. La bela montrejo por nia loka movadeto, la deko da tre interesaj kontaktoj kaj la kvar novaj gelernantoj ebligas taksii la agadon fruktedona. Refarote, do.

cp

Asembleo en Sabadell

La jara asembleo de Centro de Esperanto Sabadell okazis la 12an de marto kun rekorda minimuma ĉeesto de nur ok homoj pro malfeliĉa koincido kun samtaga manifestacio en Barcelono. Kutime la ĉeesto duoblas.



Budanoj en Prada kun najbaroj el lernejo “Bressola”

La agado de la grupo dum 2003 resumiĝas jene: budo en la libro-tago ĉe la ŝparkasa ĝardeno; kristnaska loterio; kurso elementa kun finfine ses gelernantoj kaj meza kurso kun tri lernantoj; kunlaboro en la ĉeffesto de nia kvartalo; akcepta vespermanĝo por tri eksterlandanoj nin vizitintaj: du usonaj kaj unu senegala; eldono de bulteno speciale dediĉita al la kara forpasinta samideano Antònia Galbany de Criach; kaj disponigo de nia libroservo en ĉiuj katalunaj aranĝoj.

lp

Ordinara asembleo de FOCIR

La kvinan de majo okazis, en “Centre Unesco” de Barcelono, la ordinara asembleo de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizo Internacie Agnoskitaj), kun ĉeesto de pli-malpli la duono de la membraj asocioj, inter ili KEA.

Tute pace, trankvile kaj bonorde, oni sekvis la tagordon kun la kutimaj punktoj (legado kaj aprobo de la akto de la pasinta Asembleo, bilanco de agoj kaj mono, projektoj ktp). Punkto kompreneble ne kutima estis la partopreno de FOCIR en la Barcelona Forumo 2004.

Substrekinda estas la jam anoncita devigita demisio de la prezidanto sinjoro Ignasi Doñate, kiu laboras nun en la Kataluna Registaro kiel Ĝenerala Direktoro pri Sporto. Li alparolis la ĉeestantaron kaj adiaŭis FOCIR per kortuŝaj vortoj kaj la Asembleo gratulis lin kaj deziris al li sukceson en lia nova posteno.

Por prezidi FOCIR ekde nun, kandidatiĝis sinjoro Arcadi Oliveres, de “Justicia i Pau”, kiu



15

estis akceptita kun ĝojo. Li ne povis ĉeesti la Asembleon pro foresto de Barcelono, kaj la ĉeestantoj petis al lia reprezentantino, ke ŝi transdonu al li la bonvenon de FOCIR.

nm

Poresperantaj afiŝoj

Kiel sciante, Barcelona Esperanto-Kontaktejo kreis la grandan afiŝon portitan de esperantistaj manifestaciintoj en la pacmarŝoj de la pasintjara 15a de februaro kaj de la 20a de marto ĉi-jara. Tio ne haltis ĉi tie, ĉar en la vespero antaŭ la elektoj de la 14a de marto, BEK pendigis tri metrojn larĝan tolaŝiŝon super la metrofaŭkon de la fontano Canaletes, en la plejcentro de Barcelono. Ĝi tekstis “Parlant la gent s'entén” kaj referencis al www.esperanto.net. Nur kelkajn tagojn poste, okaze de manifestacio kontraŭ terorismo antaŭ la Generalitat-palaco en Barcelono la 26an de marto, BEK pendigis samgrandan tol-afiŝon antaŭ la faŭkon de la apuda metroo kun la dulingva teksto “Katalunio Solidara / Catalunya Solidària”. Ĉi-foje la afiŝon rimarkis ĵurnalisto kaj videbla foto kun klariga teksto pri ĝi estis publikigita en la sekvataga ĵurnalo *Avui*.

es/red

Kontraŭ la detruo de Majorko

Majorkaj esperantistoj partoprenis la pasintan 14an februaro en manifestacio

lanĉita de civitanaj organizoj sub la devizo “Qui estima Mallorca no la destrueix”. Pluraj homoj, kiuj ankoraŭ ne konas nian internacian lingvon, leginte esperantan tol-afiŝon, demandis, kiu lingvo ĝi estas. Intertempe la esperantistoj kantis laŭte kaj forte “Kiu amas Majorkon, tiu ne detruas ĝin”.

Bedaŭrinde, pli da novaj konstruaĵoj, sportaj havenoj, ktp. ekstaras sur Majorko.

xm

Kontraŭ la milito

La esperanto-grupo el Meuse (Francio) petis porpacajn mesaĝojn por ekspozicio memoriganta la teruran batalon de Verduno. Alvenis respondoj el Aŭstrio, Azerio, Belgio, Benino, Bjelorusio, Ĉeĥio, Estonio, Francio, Germanio, Hungario, Israelo, Italio, Kanado, Katalunio, Kolombio, Latvio, Norvegio, Sudafriko, Togolando kaj el kelkaj internaciaj organizaĵoj. Laŭ peto de la organizintoj, la mesaĝoj estis dulingvaj: en la nacia kaj la internacia lingvoj. KEA memorigis en sia saluto pri la rilato de nia granda pioniro Frederic Pujulà i Vallès kun tiu ĉi batalo, kiu pelis lin verki du librojn kaj brulstampis lin.

Respublikisma aranĝo

Membroj de Majorka Esperantistaro rememoris respublikanajn esperantistojn murditajn de la faŝistoj dum la militribelado okazinta la jarojn 1936-1939. Ili kunvenis en la tombejo de Santa Maria del Camí la pasintan 14an de aprilo. Parolis al la ĉeestantoj Mateu Vic, nome la organizantoj, Cecili Buele, nome ERC, Xavier Margais, nome Majorka Esperantistaro, kaj diversaj reprezentantoj de aliaj maldekstraj asocioj. Fine, solene ili aŭdis la himnon de Riego kaj intertempe respublikaj kaj esperantistaj flagoj flirtis danke al la norda vento. La partoprenantoj adiaŭis la kunvenon dezirante denove renkontiĝi en la sama loko la 14an de aprilo de la venonta jaro.

xm

Aliĝo al rugbea iniciato

Eble spronite de la sukceso de la hokeistoj, la kataluna rugbe-federacio denove klopodas atingi internacian agnoskon,



kion ĝi malsukcesis antaŭ kelkaj jaroj. Estas kurioza fakto, ke ĉi tiu organizaĵo estas kunfondinto de la internacia federacio, en la 1930aj jaroj, sed devis rezigni sian membrecon post la faŝista venko. Okaze de sukceso, la teamo povus kunigi ludantojn el ambaŭ flankoj de la ŝtata landlimo, analoge al la irlandaj rugbeistoj. KEA esprimis sian subtenon, kiel membro de la Federacio de Katalunaj Organizo Internacie Agnoskitaj.

Nova vizaĝo por la brazila ret-kurso

Post la traduko de la brazila plurmedia kurso [KE 2003/2], venis la vico al la ret-paĝoj ĉirkaŭ ĝi, eldonitaj fine de la pasinta jaro. Temas pri tute tralaborita prezento tre alloga, kiu jam ekzistas en 20 lingvoj. La kataluna enkondukiĝis fine de februaro

danke al Robert Navarro, kiu kunlaboras ankaŭ en la tradukoj por ABC-Pack.

ABC-Pack en La Merkato

La aprila numero de la revuo *La Merkato* de la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo publikis tri-paĝan artikolon pri la ret-portalo pri pakado ABC-Pack (www.abc-pack.com). Kiel eblis detale legi en la decembra numero de nia revuo, temas pri komerca iniciato kunlanĉita de nia samasocio Manel Vinyals, kiu kerne uzas esperanton, kaj en kiu kunlaboras diversaj membroj de KEA.

Iom post iom la iniciato traboras sian vojon kaj atingas kontentigajn rezultojn por sia hispana fako, sed ĝi plu ĉefe bezonas diskonadon.



Kataluna Kongreso de Esperanto

Iom post iom la programo de la kongreso konkretiĝas.

KEA volas ĉiel helpi instruemulojn – ne grave, ĉu nun ili havas tempon kaj eblecojn tion fari. Tial unu el la ĉefgastoj estos, kiel anoncote, Stefan MacGill. Li gvidos seminarieton de du sesioj (po unu horo kaj duono), en kiu oni pritraktos kelkajn el la sekvaj temoj:

1. Kiel altiri homojn al esperanto-kurso? (Faru sin-prezentojn kadre de ĉi tiu komuna tasko)
2. Planu vian unuan 45-minutan lecionon. Kion ĝi bezonos, kiulingve okazu kaj kion ĝi enhavos? Kial vi faris tiujn elektojn?
3. Kiel vi povas taksu la kapablojn kaj bezonojn de viaj kursanoj? Kiel atenti ilin?
4. Kiel vi povas peri sciojn kaj entuziasmon pri la esperanto-vivo dum la kurso?
5. Kiuj eroj estu en la unuaj minutoj de tipa leciono? Kaj en la lastaj?
6. Kiel malhelpi la elformiĝon de eraroj? Kiel trakti ilin, se tamen okazas?
7. Kiel vi povas taksu la progreson de viaj studentoj?
8. Kion vi povas fari por ne perdi lernantojn tra la unuaj semajnoj de ne-deviga kurso?
9. Kiuj partoj de esperanto estas facilaj? Kiuj estas malfacilaj?
10. Kiel povas aspekti didaktika gramatiko por esperanto?
11. Ni superrigardu metodojn de lingva instruado, precipe komunik-situacion instruadon.
12. Pretigu provlecionon per lecionplano kaj realigu ĝin.

La seminarion povos partopreni nur 15 homoj, sen krompago. Bonvolu frue aliĝi. Interesitoj pri la seminario krome elektu kelkajn el tiuj eblecoj: la plej popularajn oni pritraktos.

Tamen, por ke ĉiuj kongresanoj povu iom ĝui pri nia elstara gasto, li ankaŭ prelegos pri “Ĉu esperanto havas didaktikan gramatikon?”.

Aliflanke, por nia alia elstara eksterlanda gasto, Aleksander Korĵenkov, ni ĉirkaŭiras ĉiajn obstaklojn, kiujn la vizaj burokrataĵoj –ŝajne tute alitempaj– plu devigas. Hont’!

Pri praktikaj detaloj:

Aliĝintoj ricevos liston de la hoteloj de Ceret, kun prezaro kaj telefonoj. Ili estas sufiĉe diversaj. Krom tio, povas loĝi kaj manĝi en la junulara restadejo eĉ kadukuloj super 30 jaroj. Tamen, se mankus lokoj, junuloj ricevos prioritaton.

Aliflanke, komunikeblecoj al Ceret estas malbonaj por senaŭtuloj. Se sin anoncas sufiĉaj dezirantoj, nia asocio antaŭvidas lui buson, kiu ekirus de Barcelono kaj haltus en Sabadell kaj Girona; la malan vojon ĝi, kompreneble, faros revene. Bonvolu tion atentigi, kiam vi sendos la aliĝon.



Sukcesa partopreno en Linguapax

De la 20a ĝis la 23a de majo okazis en Barcelono, kadre de la Forumo 2004, la 10a Linguapax-kongreso. La gastiganto, Instituto Linguapax, estas neregistara organizo kun sidejo en Barcelono celanta la daŭrigon de projekto Linguapax, kiu naskiĝis el Unesko-seminario en Kievo en 1987. Ĝi ĉefe subtenas politikojn flegantajn la lingvan diversecon, kaj instigas la lernadon de fremdaj lingvoj. Ĉi-okaze la organizantoj paŭsis la foruman devizon kaj invitis al kunveno ĉirkaŭ la temo “Lingva diverseco, daŭrigebleco kaj paco”. La nivelo de la kongreso estis altega, kiel atestas la partopreno de eminentaj lingvistoj kiel David Crystal, Bernard Comrie kaj Joshua Fishman. En kvar intensaj tagoj okazis sesdeko da prelegoj.

Kiel en antaŭaj okazoj, esperantistoj profitis la okazon por esprimi sian starpunkton kaj alporti siajn spertojn al la lingvistikista komunumo. Abel Montagut prezentis komunikajon kun la titolo “La kontribuo de la internacia lingvo esperanto favore al la pluekzisto de la lingva diverseco”. En ĝi, nia verkisto prezentis la viviĝon de esperanto –pasinta el nura projekto al plene funkcia lingvo– kiel unikan fenomenon, argumentis kontraŭ oftaj misprezentoj pri la internacia lingvo kaj esprimis, ke esperanto per sia neŭtraleco kontribuas al efektiva multlingvismo (ĉar ĝi postulas ĉies plurlingvecon) kaj al realigo de lingva egaleco. En malsama ateliero, Radojica Petroviĉ, prezidanto de ILEI kaj universitata instruisto pri datumbazoj kaj komputika instrumentodiko, prelegis pri “sistemo de rete bazitaj projektoj por konservi la lingvan diversecon”. Temas pri la kvar esperantaj TTT-ejoj www.lingvo.org, www.lernu.net, www.interkulturo.net kaj www.edukado.net, kiuj okupiĝas pri informado, instruado kaj utiligado, kiel li rakontas en artikolo en la maja numero de revuo *Esperanto*. Tiu ĉi sperto vekis la intereson de spertuloj pri diasporaj lingvokomumoj.

Etan sensacion vekis “neoficiala” esperantisto. Profesoro François Grin, el la Ĝeneva Universitato, prezentis pli longan raporton pri lingvoekonomiko en la ateliero pri “novaj socilingvistikaj

tendencoj kaj paradigmoj”. En la unua parto, li asertis, ke multlingveco ne estas nepre multtekosta: male, ĝi eĉ ofte estas avantaĝa. Laŭ li, post la enkonduko de naŭ novaj oficialaj lingvoj en Eŭropa Unio la impostatoj pagos ne pli ol po 5,75 eŭrojn jare pro lingvaj kostoj: sumon multe pli malaltan ol tiun, kiun pretas pagi eŭropa civitano, por povi komuniki kun la Unio en sia lingvo. Sed tre ŝokis, kiam li prezentis la bilancon de neegaleca monda lingvopolitiko, laŭ kiu kelkaj landoj povas neglekti la instruadon de fremdaj lingvoj. Li analizis diversajn avantaĝojn por la membroj de la reganta lingvo, kiuj estas bone konataj de la esperantistoj. Pro la fakto, ke Usono praktike ne enkondukas la instruadon de fremdaj lingvoj en sian eduksistemon, li taksis, ke ĝi ŝparas 16 miliardojn da dolaroj jare, kio estas tre konsiderinda parto de la landa reserĉa buĝeto. “Neanglalingvanoj pagas el sia poŝo la usonan esploradon” li sentencis. En la prelego Grin aludis al esperanto, kaj li havis okazon paroli pri ĝi dum la postprelegaj demandoj, en rilato al nobelpremiito Reinhard Selten kaj liaj esploroj.

Sed esperanto aperis ankaŭ el la buŝoj de nelingvanoj: Emili Boix, prezidanto de la Kataluna Grupo de Socilingvistiko, menciis la agadon de esperantistoj (“kaj neesperantistoj” li aldonis) kontraŭ la postulo pri “denaskaj” anglalingvanoj por postenoj en Eŭropa Unio aŭ rilataj organizoj.

Komplemente al la kongreso, en ĉiutaga aranĝo de la Forumo nomita “141 demandoj”, profesoroj Miquel Siguan kaj Jesús Tuson –lingvistoj kaj aŭtoroj pri famaj libroj pri lingvaj aferoj– babilis pri “Se ni ĉiuj parolus angle, ĉu ni pli bone interkompreniĝus?”. Ambaŭ parolis pri esperanto: eĉ Miquel Siguan partoprenis antaŭ kelkaj jaroj aranĝon organizitan de KEA. Ĉefe Tuson klare substrekiis la diferencojn inter la angla kaj esperanto kiel internaciajn lingvojn, tiamaniere ke li ŝajnis sufiĉe favora al nia lingvo.

Entute, do, sukcesa partopreno, kiu montras la gravecon de inteligenta informado celanta opini-kreantojn.

Hektor Alos i Font



Novaj-furoro

Okazis en la lasta trimestro senprecedenca apero de mencioj al esperanto en niaj amaskomunikiloj, inter aliaj kelkaj el la verŝajne plej gravaj artikoloj priesperantaj iam publikigitaj.

Tia estas la tri-paĝa prezento pri esperanto aperinta en la dimanĉa suplemento de la ĵurnalo *Heraldo de Castellón* la 25an de aprilo. Temas pri tre favora artikolo, por kiu informis KEA kaj estis intervjuitaj Abel Montagut, kiel esperantlingva verkisto, kaj Manel Vinyals, kiel mondvojaĝinto kaj esperanto-entreprenisto.

Eĉ pli elstara pro la reeĥo estas la preskaŭ tut-paĝa artikolo pri Kaj Tiel Plu aperinta en la katalunia suplemento de ĵurnalo *El País* de la 16a de marto. En ĝi la kritikisto Sergio Makaroff superŝutas la muzik-ensemblon per ĉiaj favoraj adjektivoj.

Koncerto de Kaj Tiel Plu en respublikisma aranĝo en Mataró aperis en mallonga artikolo de *El Punt* de la 13a de aprilo. En ĝi oni menciis, ke la grupo kantas en esperanto.

La sama *El Punt* en sia eldono de la 13a de majo publikigis du-kolumnan opini-artikolon de Jordi Miralles i Ferrer. En ĝi, sub la titolo “guirigall lingüístic” (lingva mikspoto) la aŭtoro, biologo kaj membro de Fondaĵo Terra, pledas por la adopto de esperanto en Eŭropa Unio.

Tiurilate *L'Indépendant* de la 27a de aprilo longe prezentis la esperanto-liston, kiu kandidatas en la eŭrop-uniaj balotoj en la Franca respubliko. La artikolo ne malfavoras la iniciaton kaj substrekas la fakton, ke la kataluna kuracisto Thierry Saladin gvidas la liston en la t.n. sud-okcidenta distrikto, al kiu Nord-Katalunio estas aligita. La sama novaĵo estis transprenita, pli mallonge, de *Vilaweb Perpinyà* en la sekva tago.

Alia tre elstara opini-artikolo estas tiu de profesoro Miquel Siguan aperinta la 18an de aprilo en *El Periódico*. Sub la titolo “la pezo de angla” la aŭtoro prezentas la lingvan monopolon de la angla en la sciencaj revuoj kaj objetas, ke ĝi povas malhelpi esploradon. Fine, li bedaŭras, ke esperanto ne estis universale adoptita.

Aliflanke, ĵurnalo *Avui* aperigis mallongan artikolon pri la ĵurnalisto kaj verkisto Pujulà i Vallès la 25an de aprilo, en kiu lia esperantisteco estas substrekita. Samĵurnale, la 4an de la sama monato aperis nekrologo pri

la 20-jariĝo de la forpaso de alia elstara esperantisto, Petro Nuez. Kaj same en *Avui*, la 7an de marto, la kolektivo J. B. Boix mencias en sia angulo kun simpatio esperantistan taksiiston Carles González (sen nomi lin). Tiu ĉi kolektiva aŭtoro evidente simpatias al nia lingvo, ĉar ankaŭ la 14an de majo ili metafore uzas la terminon “esperanto”, sed –malkiel ofte okazas– kun la pozitiva kromsignifo “klara lingvo”.

Alia artikolo pri alia antaŭmilita esperantisto aperis en tiuj monatoj: la 24an de februaro la valencia eldono de ĵurnalo *ABC* skizis la figuron de la pionira fotisto Manuel Monleon, kies esperantisteco estis menciita.

Nur kelkajn tagojn antaŭe, *Europa Press* menciis la uzon de esperanto en la multlingva aranĝo en Banyoles okaze de la tago de la gepatra lingvo, la 21an de februaro. La raporto aperis, kun ĉi tiu mencio, la sekvan tagon en la ĵurnalo *El Punt*. Bedaŭrinde la gazetara cirkulero dissendita de nia asocio, surbaze de teksto pretigita de la Brusela Komunikad-Centro, vekis neniun reagon laŭ nia scio. Feliĉe, la katalunigo de la brazila retkurso aperis kiel novaĵo en la ret-gazeto *Vilaweb* la 9an de marto kaj en la ret-rubriko de la semajna *Presència* la 19an. La aŭtoro de ĉi tiu rubriko, Martí Crespo, jam plurfoje montris sian simpatian al esperanto.

Laste, la semajnaj okcitanlingvaj novaĵoj de la Barcelona Televido (BTV), duone prizorgitaj de nia kunmembro Ferriol Macip, aperigis unu-minutan elsendon la 1an de majo pri Eŭropa Bunto, la manifestacio por la lingva egaleco organizita de la bretonaj esperantistoj antaŭ la sidejo de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo. Ankaŭ en la elsendo de la 15a de majo, okaze de novaĵo pri Rádío Occitània el Tuluzo, li menciis ĝiajn plurlingvajn programojn, inter aliaj la esperantajn. Lia esperantemo tamen kontaĝis lian kolegon Manuel Zabala, kiu parolis pri Kaj Tiel Plu kaj esperanto la 24an de aprilo.

Entute, do, malfacile egalebla kvanto da novaĵoj, ĉiuj pozitivaj, el kiuj pluraj tre okulfrapaj.

kb / mac / moc / mg / ji / fm / xm / cp / fp / red





Esperanto en lerneja eldonaĵo

En la bulteno *La Veu* de la bazlernejo CEIP Emili Carles Tolrà en Castellar del Vallès, ene de februara semajno dediĉita al la lingvoj kaj komunikado, aperis kvin-paĝa eseo pri esperanto, bele kaj taŭge ilustrita, danke al la iniciato kaj kunlaboro de nia samideano Éric Collignon el Sabadell, kiu meritas nian sinceran gratulon.

Kaj sekvos...

La aŭgusta numero de revuo *Sàpiens* (n-ro 22) enhavos ilustritan artikolon, verŝajne tri-paĝan, pri la historio de esperanto. Ĝin verkas la ĵurnalisto Jordi Basa kun la helpo de nia samasociano Francesc Poblet.

Nova esperanto-romano

Stranga librofenomeno disvolviĝas ĉe ni de la lasta jaro. En aprilo 2003 aperis la libro *Amb l'esperanto a la motxilla* de Manel Vinyals kaj Joaquim Marcoval [KE 2003/2], oktobre estis lanĉita *El manuscrit de Jules Verne* de Abel Montagut [KE 2003/4] kaj en decembro publikigis *La síndrome dels estranys sons* de Jordi Solé Camardons [KE 2004/1]. La lasta veninto, ĝis nun, en tiu esperanto-romana furoro estas *Berlin, via morta* (Berlino, saktrako), unua fikcia verko de la historiisto Francesc Poblet i Feijoo, kiu aperis en aprilo. La verko havas strukturon iom similan al *La granda kaldrono*. En ĝi interplektiĝas du rakont-fadenoj en Berlino, antaŭ kaj post la falo de la muro, ligitaj al okazaĵoj en Katalunio fine de faŝismo kaj dum demokratio. Esperanto aperas per verda stelo kaj skribaĵo sur la muro en kovril-klapo, kaj en la rakonto ĝi rolas distancige: la verko mem estus traduko de stranga esperantlingva manuskripto trovita en barcelona brokantejo. Temas pri streĉa rakonto, kie la aŭtoro lerte redonas lokojn kaj periodojn ege interesajn.

Francesc Poblet i Feijoo. *Berlin, via morta*. O Limaco Edizions, Constantí, 2004. ISBN 84-933380-2-8. 144 paĝoj.

Nova reta eldonejo

Nia juna kunmembro Ramon Rius plu aktivas rete. Nove kreita eldonejo Hel-Ikso (www.helikso.tk) publikigis kvar liajn libretojn. *Lingvaj artikoloj: kolekto* kunmetas disajn prilingvajn artikolojn de diversaj aŭtoroj aperintajn en lia TTT-ejo.

Gramàtica elemental de la llengua esperanto klare kaj kompetente prezentas la internacian lingvon: eldonaĵo tre mankinta ĝis nun en la kataluna. Bedaŭrinde ĉapelitaj literoj aperas laŭ la iksa surogato. *La Kanto de amo kaj morto de la standardisto Kristoforo Rilke* estas junaĝa prozpoemo de la fama poeto Rainer Maria Rilke. La esperantigo montras la grandan kapablon de la promesplena tradukinto. Fine ĝis nun, "*Patrino Kuraĝo kaj ŝiaj gefiloj*". *Enkonduko al la verkoj de Bertolt Brecht* estas eseeto pri la teatra teorio de la dramaturgo Bertolt Brecht.

La eldonejo celas publikigi homsciencajn tekstojn en esperanto, kaj tion pruvas ĝia lasta eldonaĵo *La Dua Hispana Respubliko*, trafa resumo de intereseĝa periodo far Pablo Foche, juna esperantisto el Jaén.

Vid-poemoj

En junio aperos la bilda poemaro de nia samasociano Ricard Jordana kaj lia edzino Maria Dolors Macarulla. Temas pri bela kaj sentema verko titolita "La vida, rai. La guerra, mai", esperantigita kiel "La vivon, sor. Militon for". Ĝi ĝuste enhavas eron en la internacia lingvo.

Maria Dolors Macarulla, Ricard Jordana. *La vida, rai. La guerra, mai (Vinyetes viscudes)*. Arola Editors, col. Dàctil Poesia núm. 10. Tarragona, 2004. ISBN 84-95985-68-3. 108 paĝoj.

Esperanto en faka kongreso

Okaze de la Internacia Kongreso pri la lingvisto kaj verkisto Antoni Maria Alcover, Xavier Margais prelegis pri "La agado de pastro Antoni M. Alcover en la proceso kontraŭ presbitero Bartomeu Font Cantallops". Temis pri unu el la malmultaj esploroj pri nia elstara lingvisto kiel ĝenerala vikario de Majorko. Bartomeu Font estis gravega esperantisto kaj tiu proceso ĉiel malhelpis lin kaj, rezulte, la insulan esperanto-movadon, kiel oni povas legi en la verko *La esperanto-movado en Majorko* de Margais. Kompreneble tiu rilato al esperanto estis substrekita de nia samasociano, kiel oni povas legi en la kongres-libro (paĝoj 319 ĝis 342).

Actes del Congrès Internacional Antoni M. Alcover. Barcelona: Publicacions de l'Abadia de Montserrat, 2003. 746 p. (Biblioteca Abat Oliva; 257). ISBN 84-8415-559-5

Ramon Rius, red: *Lingvaj artikoloj: kolekto*. Hel-Ikso, Barcelono, 2004. Serio: lingvistiko n-ro 1, 38 p.

Ramon Rius: *Gramàtica elemental de la llengua esperanto*. Hel-Ikso, Barcelono, 2004. Serio: lingvistiko n-ro 2, 23 p.

Rainer Maria Rilke: *La Kanto de amo kaj morto de la standardisto Kristoforo Rilke*. Tradukis: Ramon Rius. Hel-Ikso, Barcelono, 2004. Serio: literaturo n-ro 1, 12 p.

Ramon Rius: "*Patrino Kuraĝo kaj ŝiaj gefiloj*". *Enkonduko al la verkoj de Bertolt Brecht*. Hel-Ikso, Barcelono, 2004. Serio: literaturo n-ro 2, 22 p.

Pablo Foche: *La Dua Hispana Respubliko*. Hel-Ikso, Jaeno, 2004. Serio: historio n-ro 1, 60 p.

Pri intercivitana milito

Francesc Poblet partoprenis en la redaktado de la libro *La guerra civil a Catalunya 1936-1939, volum 1: Alçament militar i primers mesos de guerra* (Edicions 62, Barcelono, 2004) sub la direktado de Josep Maria Solé i Sabaté. Li kunaŭtoras la ĉapitron “El Comissariat de Propaganda. Un organisme pioner de la propaganda governmental a l'Estat espanyol”, en kiu legeblas pluraj referencoj al la uzado de esperanto fare de la Komisariejo pri Propagando de la milittempa kataluna registaro.

Francesc Poblet plu viglas en la revuo *Lletres*, en kies maja-junia numero, aperas lia intervjuo kun la profesoro pri nuntempa historio, poeto kaj direktoro de la kataluna Unesko-Centro Agustí Colomines.

Politika radio-intervjuo

La brazila esperanto-movado ne ĉesas surprizi nin. Post la furora lanĉo de la tre profesiaj komputila esperanto-kurso kaj la portalo Ĝangalo, nova iniciato alvenas el la sudamerika giganto. Temas pri Radio-Agentejo Mondo, radia novaĵ-servejo, kiu kaptas informojn de internaciaj okazaĵoj per lokaj esperantistoj, tradukas al la portugala kaj distribuas al malgrandaj elsendejoj. Etaj radio-stacioj ne povas havigi al si internaciajn materialojn, do ĉi tiu inform-agentejo celas parte ŝtopi tiun truon kaj tiamaniere trovi por esperanto niĉon en la amas-komunikiloj.

Tiu eksperimento naskiĝis per intervjuo al d-ro Giridhar Rao, ĝenerala sekretario de Barata Esperanto-Asocio, lige kun la Monda Socia Forumo okazinta en Mumbajo. Dua okazo estis intervjuo kun nia sekretario Hektor Alos i Font pri la madridaj atencoj, la sekva inform-agado de la hispania registaro kaj la konsekvencaj balotaj rezultoj.

La intervjuoj, faritaj per ret-babila programo kaj komputile registritaj, estas poste pritraktitaj kaj tradukitaj al la portugala, tamen la esperanta elparolo restas klare aŭdebla. La originalaj intervjuoj estas aŭskulteblaj ĉe aede.org.br/radio

... Kaj en *Monato*

Hektor Alos longe kontribuis pri la sama temo al la maja numero de la magazino

Monato, kiu ĉeftitoligis sian frontpaĝon “Madrido 11 marto, Politikaj ofertoj”. Li plenigas kvar paĝojn sub la senkompromisa titolo “Kroniko de kanajla mistifikado”. En ĝi la aŭtoro detale priskribas la okazaĵojn dum la 11a, 12a kaj 13a de marto en Hispanio. Aneksa la artikolo “Amarega venko” analizas la rezultojn de la balotado de la 14a sammonate.

Polemiko en *Pola Radio*

La elektorezultoj atingis ankaŭ alian elstaran esperantlingvan informilon. La 21an de marto *Pola Radio* dislegis leteron de usona esperantisto, kiu asertis, ke timo puŝis hispanianojn voĉdoni kontraŭ la registaro. Reagoj ne atendis, danke al atentigo en nia ret-listo: en la sekva elsendo de la rubriko Leterkesto, dimanĉon la 28an de marto, estis legitaj replikoj de Hektor Alos kaj Darío Rodríguez.

Dalí en *Literatura Foiro*

En la aprila numero de la revuo *Literatura Foiro* aperas kvarpaĝa traduko de Abel Montagut. La teksto, de Salvador Dalí, estas titolita “La lasta manifesto. La realismo” kaj enhavas subtitolojn “Akuta sibirita realismo” kaj “La telefonbudo”. Ilustras ĝin kelkaj desegnaĵoj de la eminenta artisto, kies centjaran jubileon oni festas dum 2004.

Recenzo en *La Ondo*

La Ondo de Esperanto aperigis en sia aprilo numero draŝan recenzon de Hektor Alos i Font pri la libro *Intrigo-teatro*, eldonitan de esperanto-grupo de Valencio. Temas pri tute negativa takso de la libro finiĝanta per peto ne aĉeti ĝin.

Someraj kongresoj

La ĉi-jara IJK en Rusio vekis grandan intereson. Laŭ nia scio aliĝis naŭ gekatalunoj, kio estas rimarkinde pli ol en en la lastaj jaroj. Kontraŭe, la foreco de la Universala Kongreso ŝajne nur logis kvar niajn samasociojn. El la someraj aranĝoj, certe la plej partoprenita estos la Eŭropa Kongreso en Bilbao, de la 25a ĝis la 29a de aŭgusto: aliĝis ĝis nun 15 homoj pere de KEA, sed tiu nombro facile povas ankoraŭ kreski.



Interreta rubriko

Jen retpaĝo pri originala literaturo en esperanto, kiu ampleksas pli ol mil dokumentojn, kun recenzo de la verkoj, bildoj kaj ligiloj al eksteraj paĝoj: esperanto.net/literaturo/index.html

Baza legolisto de originala esperanto-literaturo troveblas en: homepage.ntlworld.com/edmund.grimley-evans/legolisto.html

Prelego pri Lidja Zamenhof, la plej juna filino de la kreinto de nia lingvo, kiu tragike mortis en la nazia koncentrejo de Treblinka, estas legebla en la ampleksa retpaĝaro de Brazila Kooperativo de Esperantistoj; ankaŭ videblas tie aliaj interesaj prelegoj. www.kke.org.br/esperanto/prelegoj/index.php

Bertilo Wennergren kreis antaŭ ioma tempo utiligan makroon por konvertado inter ĉiuj esperantaj skribosistemoj por MS Word. Nun li disponigas similan makroon por la libera programo Open Office: www.bertilow.com/komputo/openoffice.html#makrooj

Lingva angulo

Kategorioj kaj individuoj aŭ pri la manieroj uzi “kio” kaj “kiu”

Ofte, instruante la lingvon, oni kutimas diri (aŭ skribi) ke la u-formoj uziĝas por homoj kaj la o-formoj por bestoj kaj objektoj. Tia instruado estas erara, kiel tujsekve estos montrite. Ĉi-esploro celas frazojn kie “kio” kaj “kiu” rolas kiel pronomaj (memstaraj) demandoj.

En la Ekzercaro (paragrafo 12) aperas la demando:

Kion Dio kreis en la sesa tago?

Kaj en la Sankta Biblio (Genezo, 1:27) ni trovos la koncernan respondon:

Kaj Dio kreis la homon laŭ sia bildo ...

Similmaniere, ni konstruu la frazon:

Kiu estas(is) la plej fama gorilo en la tuta mondo?

Kaj certe ĉiu scios respondi:

Ĝi estis “Neĝereto” (“Floquet de neu”).

Se oni deziras pli memstaran demandon, oni povos diri antaŭ foto de ĝi:

Rick W. Koshko aperigas ĉiumonate astronomian almanakon kun la plej rimarkindaj eventoj observeblaj en sia retpaĝo: www.koshko.com/almanako

Se vi havas intereson pri radiostacioj elsendantaj en esperanto, tiu ĉi estas nepre konsultenda paĝo, kun multnombraj sonarhivoj: www.radioarkivo.org

Don Harlow enretigis belan esperantan version de “Elektitaj poemoj” de Heinrich Heine, tradukitaj antaŭ naŭdek jaroj far Friedrich Pillath: donh.best.vwh.net/esperanto/Literaturo/Poezio/heine/

La interesa retgazeto pri movadaj temoj *Libera Folio* havas nun novan retadreson kaj pli allogan prezenton: www.liberafolio.org

Dankon al Gerard Escuer pro la jena retadreso, en kiu SAT publikigis korektojn de eraroj en la Nova Plena Ilustrita Vortaro de esperanto: satesperanto.free.fr/aktuale/NPIV-korektoj.pdf

Interesa fotogalerio pri Zamenhof troveblas en: eeo.8k.com/Zamenhof/ZamenFot.htm

Nia Akademio disponigas la kompletan tekston de la Fundamento de esperanto (france, angle, germane, ruse kaj pole): Www.akademio-de-esperanto.org/fundamento/index.html

La Reta Informado-Centro celas subteni informantojn pri nia lingvo, per provizado de ĉiaspecaj rimedoj: konsiloj, informileroj, bildoj, faktoj pri esperanto kaj la movado ktp: www.ikso.net/ric/

Pluraj esperantistoj emas legi la novaĝ-grupon soc.culture.esperanto. Foje ne estas facile trovi adekvatan servilon por la novaĝ-grupoj de Usenet. Eblas aliĝi al la senpaga servilo de la Libera Universitato de Berlino: news.individual.net/

Dario Rodríguez

Kiu estas tiu?

kaj la respondo:

Tiu (aŭ “ĝi”) estas “Neĝereto”.

Vilho Setälä klare instruas tiajn aferojn en sia lernolibro Privilegia Vojo. En ĝi rolas tri kokidaj gefratoj: Riko, Keko kaj Konjo. La proponitaj modeloj tekstas (paĝoj 4a kaj 5a):

Demando: Kio estas Keko?

Respondo: Keko estas koko!

D: Kio estas Konjo kaj Riko?

R: Ili estas gefratoj.

Kaj en la paĝo 6a:

Konjo: Kiu mi estas?

Riko: Vi estas Konjo.

Tiuj simplaj kaj malmultaj ekzemploj pravas la proponitan aserton, ke “kio” **ne** validas nur por bestoj kaj objektoj kaj “kiu” nur por homoj.

La kerno de la afero kuŝas en tio, ke

“kiu” celas individuojn kaj “kio” kategoriojn. Plena Analiza Gramatiko (fino de la 59a paragrafo) prave insistas en tio:

Kiu demandas pri la individueco de persono aŭ afero:

«Kiu estas vi? - Mi estas Andreo Cseh.

Kiu estis la unua Esperanta gazeto? - “La Esperantisto”.»

Por fini decas aldoni, ke, ĝenerale, bestoj ne ĝuas individuecon el homa vidpunkto kaj el tio verŝajne fontas la persistema eraro. Eĉ pri tio, tamen, ekzistas esceptoj, ĉe kiuj individueco estas tre grava. Ekzemple, pensu pri la mondo de vetkurado de ĉevaloj: ne nur la kurantaj bestoj havas proprajn nomojn sed eĉ iliaj familianoj: patro, patrino, avoj, ktp.

Ramon Perera

Esperanto, se ne parolata almenaŭ pristudata



*Pedro Martín Burutxaga
intervjuas Ricard Guasch Montaner*

Jam de pluraj jaroj, ĉiu kataluna abiturientiĝonto en sia lasta jaro devas pretigi sciencan verketon pri afero libere elektita. Multaj rigardas tion simple kiel plian devigan tedaĵon, sed por kelkaj tiu estas tre bona okazo por pruvi sian kapablon sendepende science labori. Rezultoj estas kompreneble tre variaj, sed iam-tiam ja aperas interesaj, sufiĉe bonkvalitaj verkoj, kiuj meritas atenton.

Lastatempe ni eksciis pri du el tiaj verkoj, kiuj koncernas nin esperantistojn.

Sub la titolo “L’Esperanto, una llengua diferent per una comunicació més justa”, Alba Garriga Gabaldà, el Sant Pere de Ribes, kiu lernas en Escola Massana, prezentis verketon pristudantan esperanton kiel komunikan fenomenon. Ŝi klarigas tiun elekton, ĉar iam ŝi legis informilon, kie oni asertis: “esperanto ne estas la lingvo de iu kulturo, sed la lingvo de ĉiuj kulturoj”, kaj ĉar ŝi interesiĝas pri la fakto ke multaj lingvoj nun riskas malaperi fronte al aliaj kiuj, kiel la angla, havas pli grandajn politikan, socian kaj ekonomian subtenon. En sia verko Alba aldonas mallongan historion de la movado, mencion al ĝia kreinto, la bazajn regulojn de la lingvo, la “internan ideon” kaj la nunan situacion.

Pli konkreta kaj interesa el movadana vidpunkto estas la verko de Ricard Guasch Montaner, 17-jara liceano loĝanta en La Bisbal del Penedès, kiu elektis pristudi la historion de nia movado en la tiel nomata “granda” Penedès, t.e. regionoj Alt kaj Baix Penedès kaj Garraf. Lia verko estis prezentita la 30an de marto antaŭ instruista tribunalo de IES Andreu Nin (El Vendrell), kiu donis al ĝi la plej altan noton. Pri si kaj sia verko la juna aŭtoro, mem esperanto-parolanto, afable akceptis respondi al jenaj demandoj:

Kiam kaj kial vi lernis esperanton? Ĉu estis esperantistoj en via familio?

Ne, tute ne estis esperantistoj en mia familio, nek mi konis iun ajn esperantiston. Mi aŭdis paroli pri esperanto antaŭ ĉirkaŭ du jaroj. Ekde tiam ĉe mi vekigis granda intereso pri la lingvo kaj ĝia movado kaj mi eklernis esperanton en marto 2003.

Kiu estas la titolo de via verko?

Història del moviment esperantista a les capitals del Gran Penedès.

**Ĉiuj grupoj
kiuj fondiĝis
dum la unua jardeko
de la pasinta jarcento,
malaperis ekde 1936**

Esperanto-grupo Frateco el El Vendrell en 1910



Kial vi elektis tiun temon por via verko? Ĉu antaŭa eklerno de esperanto influis vian decidon?

Jes. Mi elektis tiun temon, ĉar ĝuste tiam mi lernis esperanton. Mi opiniis la temon tre interesa kaj mi multe pli scivolis pri esperanto, Zamenhof kaj esperanto-movado. Ankaŭ mia instruisto opiniis ĝin tre interesa.

Ĉu vi spertis multajn malfacilaĵojn dum via serĉado?

Jes. Unue mi planis verki pri la historio de la Penedesa esperanto-movado, sed mi havis nelongan tempon: tiu estis la unua malfacilaĵo. Poste mi ne trovis ĉion, kion mi bezonis por rekonstrui la plenan historion: ekzemple, en la Vilafranka biblioteko mi preskaŭ nenion trovis pri la afero. Krome, plenumi reserĉan laboron dum la lasta kurso, antaŭ ol iri universitaton, ne estas facile.

Kiom longe vi laboris por pretigi vian verkon?

Mi eklaboris mezmaĵe pasintjare. Unue mi legis *Zamenhof, autor de l'esperanto* kaj *Història del moviment esperantista al Vendrell*, kiun Pedro

M. Martín afable sendis al mi. Post la somero mi serĉis en la Penedesaj bibliotekoj, en la arkivo de la esperanto-grupo de Vilanova i la Geltrú kaj en la Hispana Esperanto-Muzeo de Sant Pau d'Ordal. Fine de marto la verko estis preta.

Kiu estas la plej frua mencio al esperanto en Penedès kiun vi trovis?

En la Hispana Esperanto-Muzeo troviĝas poŝtkarto sendita el Portugalio al Vilanova esperantisto Josep Vidal i Llopart la 8an de februaro 1899. Fakte, tiu poŝtkarto ne nur estas la plej frua mencio al esperanto en Penedès, sed ankaŭ en Katalunio.

Kia estas la nuna situacio de la esperanto-movado en Penedès?

Bedaŭrinde, hodiaŭ estas esperanto-grupo nur en Vilanova i la Geltrú. Ĉiuj grupoj, kiuj fondiĝis dum la unua jardeko de la pasinta jarcento, malaperis ekde 1936. En Vilanova i la Geltrú kaj en Vilafranca naskiĝis novaj grupoj, sed hodiaŭ restas nur la esperanto-grupo de Vilanova i la Geltrú, kies prezidanto estas Joan Inglada.

Ofte esperanto estas miskonata de la ĝenerala publiko. Ĉu vi havas iun ajn anekdoton rilate al via reserĉa laboro?

Preskaŭ ĉiam, kiam mi parolas pri mia laboro, mi devas aldoni kio estas esperanto, kio iomete kolerigas min. Tial mi esperas, ke mia laboro disvastigu, almenaŭ inter miaj gekunuloj, kio estas esperanto kaj ĝia movado en Penedès.

La laboro alportis al mi ne nur novajn konojn pri historio, sed ankaŭ la bazan konon de esperanto. Tiuj scioj multe helpis min, ĉar ofte tio, kion mi trovis dum la serĉado, estis en esperanto; krome ili ankaŭ permesis al mi konatiĝi kun geesperantistoj el ĉie.

Rilate al reserĉa laboro, havi manuskripton de Zamenhof ĉemane multe ĝojigis min, same kiel ankaŭ la fakto, ke du instruistinoj interesiĝis kaj demandis de mi esperantan kurson. Sed vera anekdoto estas tiu ĉi neatendbla intervjuo.

Koran dankon.

Esperanto sur la politika areno

Antaŭ kelkaj monatoj okazis tre vigla debato en Francio pro la projekto krei politikan partion kaj liston de kandidatoj por la venontaj eŭropaj balotoj. Starigis tiun projekton Kristian Garino, de la asocio Esperanto-Vive en Chambéry (Savojo). Li ne vere celis havi elektiton, sed nur ĉefe aperi en la tutlandaj televid-stacioj, ĉar en Francio, ĉiuj partoprenantoj en la landaj balotoj rajtas laŭlege havi iom da tempo en politikaj elsendoj por prezenti sian programon. Ne nur la stacioj sed ankaŭ ĉiuj ĵurnaloj, laŭ K. Garino, parolus pri esperanto, kaj la aliaj politikaj partioj devus debati pri la problemo de la lingvoj en Eŭropo.

Multaj kontraŭis tiun projekton. Unue, pro “filozofia” vidpunkto: ĉu esperanto devas eniri tiel rekte sur la politikan arenon; ĉu starigi, estri kaj

regi politikan partion estas la afero de esperantistoj? Due, pro praktikaj kialoj: kvankam ĉiu partio, kiu sin prezentas al la balotado, rajtas aperi, ne ĉiuj havos la saman tempon por paroli; la “parlamentaj” disponos pri po unu horo, dum la aliaj dividos inter si... unu horon! Aliflanke, kun tiel malforta movado malantaŭ si, kiu aktivus por kampanji, debati, trovi monon por presi afiŝojn, informilojn, voĉdonilojn? Ĉu la ĵurnalistoj ne mokos nian tiel malviglan esperanto-movadon? Malgraŭ tio, dum la pasinta vintro naskiĝis la partio *Espéranto Et Démocratie* (EDE, “esperanto kaj demokratio”); en ĉiu balotregiono, starigis listoj de kandidatoj.

Kio pri la nunaj rezultoj? La ĵurnaloj parolas pli-malpli pri la projekto, se ne favore almenaŭ ĝis nun ne malfavore. En la televido, la multobligo de

neparlamentaj listoj ebligis nur trifoje 75 sekundojn da elsendo, sed la unuaj reagoj ŝajnas tre favoraj kaj fruktedonaj. Pro manko de mono, preskaŭ neniu propagandilo estos presita (krom en Elzaco, kiu eĉ havos balotilojn); la voĉdonontoj ricevos do neniun informon rekte pri EDE. La partio “La Verduloj”, kiu aperigis subtenon al esperanto en sia informilo kaj en sia TTT-ejo ne tro ŝatis la starigon de ĉi tiu listo. Fine, neniua debato pri lingvo okazis en Francio. Estas konate, kia estas la lingvopolitiko en Francio, des pli de katalunoj. Je loka, regna aŭ eŭropa nivelo, nur unu lingvo taŭgas laŭ la franca politikistaro: la franca. Ni atendu la finon de la eksperimento, la 13an de junio, por konkludi.

Christian Pinard

El romaní, llengua oficial?

Després de l'ampliació del maig, el poble romaní ha passat a ser la minoria nacional més gran de la Unió Europea: en el territori dels 25 estats membres hi viuen prop de 12 milions de gitanos. D'això es va parlar, entre altres temes, a la conferència internacional organitzada per la Comissió Europea a Brussel·les sobre "els romí en una Europa més àmplia".

Entre els conferenciants, hi havia Katalin Lévai, ministra hongaresa per la igualtat d'oportunitats, que va declarar a l'agència de notícies MTI que precisament perquè els gitanos s'han convertit en el grup ètnic minoritari més gran de la Unió cal considerar l'oficialització del romaní al mateix nivell que les llengües estatals considerades oficials. Va afegir que presentaria la proposta als òrgans corresponents.

Amb la incorporació de nou estats més, la Unió Europea ha passat d'onze a vint llengües oficials.

RomNet

Tolosa es reoccitanitza

Tolosa recupera el nom dels carrers. El passat 25 de maig ja s'havien col·locat 200 plaques a 50 carrers. La senyalització en occità ha d'arribar fins als 400 carrers, gairebé tota la vila. Tots els nous carrers seran sistemàticament proveïts de plaques en occità.

Això és possible gràcies a una iniciativa del Corrent Revolucionari Occitan (CROC) i d'una cinquantena de col·lectius agrupats sota el nom de Convergència Occitana, que van aprofitar les passades eleccions municipals per comprometre els polítics. L'Institut d'Estudis Occitans s'ha encarregat de vetllar per la correcció dels noms.

Caldria també fer esment de les 47 plaques històriques plaçades a terra que permeten donar a conèixer la història d'un monument o d'un lloc de la vila, tot i que hi va haver reticències per part de les autoritats locals sota el pretext que podrien fer relliscar els vianants.

Aviat podrem parlar de la senyalització del metro, també en la llengua del país.



Nova retolació dels carrers de Tolosa de Llenguadoc

Serà divertit comprovar si el "Pont des demoiselles" es torna a dir "Pont de las Putas".

Infòc/fm

Crítiques a la versió de Windows en maputxe

El passat novembre, la multinacional Microsoft i el govern xilè van anunciar a toc de bombo i platerets un acord per traduir el programari Windows XP a la llengua maputxe. El president del Consell de Totes les Terres i cap maputxe va posar en dubte, però, els beneficis de l'acord. "L'empresa ens ho hauria d'haver consultat, abans d'emprendre qualsevol acció d'aquest tipus" va declarar, tot afegint que el seu poble considera que Microsoft només té interessos comercials en aquest assumpte. Alguns professionals maputxes, però, opinaven tot el contrari, com Francisco Painepán, president de l'Associació Gremial d'Empresaris Maputxes.

El pla s'inscriu en una maniobra de Microsoft per ampliar el nombre de llengües d'alguns dels seus productes per poder competir amb el programari lliure, que s'està estenent considerablement entre els parlants d'idiomes minoritzats. El maputxe és una llengua amb uns 400.000 parlants majoritàriament de Xile. El seu nom deriva de *mapu*, 'terra, país', i *txe*, 'gent'. Els maputxes anomenen la seva llengua *mapudungu*, paraula creada

anàlogament i on *dungu* significa 'llengua, parla'.

La Vanguardia / red

L'anglès perdrà pistonada

Segons un estudi publicat el febrer per la revista *Science*, el 2050 només el 5% de la població mundial tindrà l'anglès com a llengua materna, davant del 9% que l'hi tenien el 1995. L'autor de l'estudi, David Graddol, analitza com afectaran les evolucions demogràfiques sobre el conjunt de les grans llengües.

El mandarí continuarà molt destacat com a primera llengua pel nombre de parlants, però les quatre següents anglès, castellà, hindi-urdú i àrab tendiran a igualar posicions. Idiomes com el bengalí i el tàmil s'hi aproparan molt.

Si bé l'anglès no s'haurà empassat la resta de llengües, sí que, segons l'estudi, les haurà arraconat en l'àmbit científic. L'article afirma que a la dècada de 1980, prop del 60% dels articles científics eren escrits en anglès i que ara són gairebé el 90%. D'aquí a 45 anys, tots els científics parlaran anglès, conclou.

El fenomen de bilingüització amb l'anglès és el que Graddol preveu que es generalitzi a Europa, amb l'anglès com a interllengua. Espanya és dels estats que van més endarrerits en aquest procés, amb menys del 20% de la població que parla anglès, a l'extrem oposat s'hi troben Holanda, Suècia i Dinamarca, on un 80% de la població sap anglès.

En relació a les llengües menys parlades, Graddol preveu un daltabaix. Vaticina que desapareixeran gairebé el 90% de les 6000 llengües que ara es parlen al món, aproximadament una llengua cada tres dies. S'aniran perdent les llengües rurals, però a la vegada aniran sorgint nous híbrids

urbans que, segons l'article esmentat, faran que es mantingui la diversitat.

Soprèn molt aquesta afirmació en tant que els criolls que es formen en les comunitats urbanes ho hauran fet en uns pocs decennis, mentre que les llengües que substituïdes, suposadament mantenint-ne la diversitat, hauran necessitat segles per formar-se. De la mateixa manera intriga com pot ser que desapareguin el 90% de les llengües del món en un període excessivament reduït, probablement sense que l'anglès, la segona llengua del planeta, no absorbeixi cap de les antigues comunitats lingüístiques: la situació a l'Amèrica del Nord i al Pacífic no ho fa gens creïble. Finalment, sorprèn l'afirmació que la bilingüització europea amb l'anglès no causi interferències substancials en les llengües, com és comprovable en el cas de Catalunya i com determinats estaments ja han denunciat, per exemple els Països Baixos.

La Gaceta de los Negocios / red

L'arameu al cinema

S'ha estrenat una pel·lícula en una llengua morta, segons afirmen força publicacions. L'arameu, però, és encara parlat per més de 200.000 persones. *La Passió de Crist* és un film bilingüe en llatí i arameu. Més concretament, els idiomes que s'hi utilitzen són l'arameu occidental de l'època i el llatí col·loquial. Per això el director Mel Gibson va contractar el servei del pare William Fulco, catedràtic d'Estudis Mediterranis de la Loyola Merrymount University de Los Angeles, un dels especialistes capdavanters en la llengua aramea i en les llengües semítiques clàssiques. Va ser ell que va traduir el guió original anglès a l'arameu del segle I i també es va encarregar de fer escoltar als actors la llengua actual i de donar-los lliçons de fonètica.

Infòc



Aŭtuna renkontiĝo

18a-19a septembro - Dig-lago de Sau - Restadejo "Els Porxos"

La renkontiĝo komenciĝos sabate posttagmeze kaj daŭros ĝis dimanĉo post la tagmanĝo. La prezo inkludas tranoktadon kaj manĝojn. Bonvolu kunporti dormsakon aŭ littukojn. Senaŭtulojn oni veturigos de Vic.

La trobada serà des de dissabte a la tarda fins a diumenge havent dinat. El preu inclou l'allotjament i els menjars. Porteu sac de dormir o llençols. S'acompanyarà els qui no tenen auto des de Vic.

KEA-anoj: 34 eŭroj
KEJ-anoj: 32 eŭroj
Infanoj ĝis ok jaroj: 26 eŭroj